



TEA-BULTENO

11^A JARO

SEPTEMBRO - NOVEMBRO 2008

NUMEROJ 9-10

Ĉiam amikoj sin deklaras sinceraj, sed - envere - la plej sinceraj estas la malamikoj.

Arthur Schopenhauer

Olimpio, Olimpiado, Olimpikoj

Ĵus finiĝis la 29^a Olimpiko en *Beijing* (Ĉinio) kaj indas iomete pripensi pri tiu ĉi evento, kiu implikis pluregon da landoj, homoj, atletoj, organizoj. Finiĝis la vastega dissendado de novaĵoj, TV-servoj el konkurs-kampoj, intervjuoj al venkintoj kaj mal-, kaj surtute tiu lavango da reklamadoj fare de ĉiuspecaj sponsoroj. Malleviĝis la kurteno sur la konkursoj kaj nun atendas nin, en revuoj kaj ĵurnaloj, alia lavango da statistikoj: kiom da partoprenintoj, kiom da medaloj, kiom da rekordoj, kiom da ... elspezoj.

Ĉar esence tio estas la nuntempaj Olimpikoj, la Modernaj Olimpiaj Ludoj, kiel korekte oni devus ilin nomi.

Ja, la Antikvaj Olimpiaj Ludoj naskiĝas, proksimume dum la oka jarcento a.K., ĉe Helenoj kiel atletikaj kaj religiaj celebradoj honore al Zeŭso, – maksimuma dio de la helena civilizaĵo – okazantaj ĉiun kvaran jaron, en la urbo Olimpio.

Al ununura konkurso – nomita *Stadion*, el kiu la nunaj vortoj 'stadion, stadion' – aldoniĝas poste aliaj sportoj: bokso, lukto, pankraco – kruelega lukto, kelkfoje eĉ mortiga, el kiu povus deveni la moderna *wrestling* (usona libera lukto) – rajdkonkursoj kaj *pentathlon* (pentatlon), nome kvin konkuradoj fare de la sama atleto: lanco- kaj disko-ĵetado, kurado, lukto kaj longosaltado. Tiuj Ludoj fariĝas, dum la tempo, granda defio inter la plej fortaj homoj el ĉiuj diversaj helenaj ŝtato-urboj: ilin povas partopreni nur liberaj viroj helenparolantaj, posteuloj de la helenaj avoj. Plue, dum la Ludoj devige ĉesas ĉiuj konfliktoj en la tuta Helenujo: do, la evento fariĝas preskaŭ ia rita soleneco de milito.

La Olimpiaj Ludoj daŭradas, laŭ historio, de 776 a.K. kaj la intervalon inter du olimpiaj ludoj la helenoj nomas Olimpiado, ĝin uzante kiel tempokalkulan manieron.

Sed, ĉiam malpli gravaj, dum laŭgrade kreskas la Romia povo en Grekujo, en la jaro 393 p.K. ili estas malpermesitaj de la romia kristana imperiestro Teodozio la 1-a, ĉar konsiderataj "pagana festo".

Ĝia longdaŭra sukceso eble devenas el la nesubpremebla instinkto ĉe homo eminenti inter la anoj de sia grupo, teamo, tribo): eble, tia elstaremo similas al konduto de gregestro kontraŭstare al la aliaj bestoj de sia aro, kiu luktas kun la aliaj virbestoj por pluteni sian altranĝon.

Sed la memoro de tiu tradicio, daŭranta en Helenujo pli ol 1100 jarojn, ne perdiĝas. En la 17-a kaj 18-a jc sportaj eventoj laŭ nomo de Olimpikoj, intermite okazas en Britio, Francio kaj Grekujo ĝis kiam, duone de la 19-a jc, malkovro de la restaĵoj de la antikva urbo Olimpio, favoras plian interesiĝon. Samtempe en Francio, post la malvenko dum franco-prusia milito, barono *Pierre Fredi de Coubertin* planas organizadon de Ludoj similaj al tiuj malnovaj Olimpiaj, cele al plibonigo de gimnastiko ĉe junularo kaj, laŭ la tiutempaj idealoj – endas memori ke oni estas sojle de la nova jarcento, tiu 1900 "alportonta progreson kaj bonstaton" al homaro – ankaŭ por permesi al la junuloj de malsamaj nacioj interkonatiĝi kaj alfronti unu la alian per sporta konkuro, prefere ol dum milito. Fondiĝas la unua Internacia Olimpia Komitato kaj, en 1896, la unuaj Modernaj Olimpiaj Ludoj okazas en Ateno, ĉefurbo de la lando kie la Antikvaj **star-**

tis. De tiam la slogano estas: "*Citius, altius, fortius*", nome "Pli rapide, pli alten, pli forte".

Granda sukceso: partoprenas 245 atletoj el 15 landoj. Kaj ekde tiu unua fojo la Ludoj sinsekvas, samkiel la Antikvaj, ĉiun kvaran jaron ĝis nuntempe, escepte en 1916, en 1940 kaj 1944 pro la mondaj militoj.

Iom post iom kreiĝas organizo, regularoj, flago: tiu fama kun kvin cirkloj interplektitaj sur blanka fono, kies kvin malsamaj koloroj estas tiuj ĉeestantaj en la flagoj el ĉiuj landoj kaj ne reprezentas la kvin kontinentojn, kiel erare oni kutime supozas.

Kromaj sportoj aldoniĝas ĝis atingo de la nuntempaj pli ol 30, kun pluraj disciplinoj, viraj kaj virinaj. Ĉirilate indas memori, ke en la Antikvaj Ludoj al virinoj ne nur estis malpermesite partopreni, sed eĉ spekti la konkursojn: kaj trejnistoj kaj atletoj devige prezentiĝis nudaj, ĝuste por pruvi sian senduban virecon!

En *Beijing 2008* partoprenis pli ol 25 mil atletoj el proksimume 200 landoj: notindas kiel la nombro de reprezentitaj nacioj superis tiun de la UNO-membroj, pro ĉesto de teamoj ankaŭ el kolonioj kaj departementoj.

Kompreneble, ju pli la organizo grandiĝas des pli grandaj estas la oniaj interesoj cirkaŭ la tuto: spektantoj, informiloj, sponsoroj, provizantoj kaj la gastiganta ŝtato mem, pro pliiĝo de propra prestiĝo.

Rimarkinda atesto estas la Olimpiaj Ludoj de Berlino en 1936, kiujn la Nazia regno organizas kiel grandan manifestacion pri potenco kaj supereco de la germana popolo – purrase arja – precipe politik- kaj propagand-cele al



germanoj. Tiam, unuafoje estas reprenita la helena rito pri ĉeesto de la olimpia fajro dum la Ludoj: fakte, el la greka urbo Olimpio specialan torĉon, ekbruligitan per suno, portis al Berlino stafeto de torĉoportantoj. De tiam tiu rito ripetigas je ĉiu olimpiko kaj ĉijare la stafeto laŭiradis pli ol 100.000 km-ojn cirkaŭ la mondo, antaŭ ol alveni al Pekino, kie, dum ege fantasmagoria prezentado, oni ekbruligis la olimpian fajron por tiamaniere oficiale malfermi la Ludojn.

La ĉijaraj Ludoj estis granda parado de kiaj rezultoj ka-

pablas atingi viroj kaj virinoj, post longa trejnado, per persista volo kaj atenta memrego: oni starigis plurajn novajn olimpikajn kaj mondajn rekordojn, precipe pri naĝado kaj kurado, celante pruvi al la publiko – ĉeestanta samkiel tiu antaŭ-TV-a – sed aparte al si mem, propran superecon, pri kiu fieri. Ĉiam respektante la kontraŭulon.

Tiel unue sloganis la iniciatinto de la Modernaj Olimpiaj Ludoj, *de Coubertin*, : “Ne gravas venki sed partopreni”.

VIGLO



Rakontu al mi fabelon...

Antaŭ multe da jarcentoj, ĉu vi kredu aŭ ne, la tero estis verda kaj agrable freŝa, miloj da riveretoj ĝin trafluadis, la arboj riĉis je ĉia fruktaro, kaj la homoj, nenion sciantaj pri malbono, feliĉaj vivadis sen batali unu kontraŭ la alia.

Alaho estis dirinta al la homoj: “Tiu ĉi estas via ĝardeno kaj viaj estos ĝiaj fruktoj. Nura postulo estas, ke ĉiam vi agadu juste, alie mi faligos sableron sur la teron kiam ion malbonan vi faros, kaj – iun tagon – tiu ĉi verdaĵo kaj tiu ĉi agrabla freŝeco povus eĉ malaperi!”

Dum longa tempo ĉiuj rememoris tiun admonon, sed, iun malbelan tagon, du viroj ekdisputis pri posedo de kamelo kaj, en la momento kiam la unua fivorto estis elbuŝigita, Alaho faligis teren la unuan sableron, tiel etan ke neniu rimarkis ĝin.

Tre baldaŭ la du kverelantoj, post aĉa vortbatalo, ekinterbatiĝis kaj tiam oni ekvidis, ke sabla monteto malrapidete leviĝadis. Tiam la homoj demandis Alahon, pri kio temas, kaj li klarigis: “Tio estas la frukto de via malboneco – ĉiufoje ia malbona ago okazos, sablero falos kaj aldoniĝos al la aliaj, ĝis kiam, eble, sablo iam kovros la tutan teron.” Ĉiuj ekridis kaj pridubis liajn vortojn, pensante ke, eĉ se oni estus tiom ekstreme malbonaj, necesus milionoj kaj milionoj da jaroj, antaŭ ol tiu subtila polvo kovru la teron, endanĝerigante la tutan homaran vivon.

Tial oni komencis batali unu kontraŭ la alia, triboj kontraŭ triboj, ĝis kiam la sablo surkovris kamparojn kaj paŝtejojn, forviŝis riveretojn kaj devigis la bestojn malproksimen iri por nutri sin. Tiel kreiĝis la dezerto kaj ekde tiam la triboj vagadas inter la dunoj, loĝas en tendoj, akompanataj de kameloj dum la longdaŭraj migradoj. Kaj en ilia koro kaŝiĝas la revo pri la perdita tero. Por ke ne estu forgesataj la bildoj pri la iama naturo, Alaho faris tiel, ke de tempo al tempo antaŭ iliaj okuloj sin prezentu la bildoj de la malaperintaj plantoj kaj akvoj: tial, fojfoje, la pasanto en la dezerto vidas objektojn tute ne ekzistantajn, eĉ ilin strebas tuŝi, sed tiuj abrupte foriĝas. Ŝajnas sonĝoj kun nefermitaj okuloj: estas la miraĝoj.

Nur por la homoj, observantaj la leĝojn de Alaho, ekzistas ankoraŭ riveretoj kaj palmaroj, kiujn sablo ne surkovras sed ilin nur ĉirkaŭas, kiel la maro ĉirkaŭas insulon. Tiuj apartaj lokoj nomiĝas “oazoj” kaj tie la homoj haltas por trovi akvon, manĝi kaj ripozi, memorigante ĉiufoje al si mem la vortojn de Alaho: “Ne transformu mian verdan mondon al senfina dezerto!”

Ĉu en la vortoj de Alaho kuŝas ja la vero? Fakte, dum la nuna tempo la homo ĉiam pli fiagas per ĉiutagaj bataloj, militoj, atencoj tra la mondo: samtempe la sciencistoj taksas iom-post-ioman plian dezertiĝon sur la tero, eĉ foteblan de satelitoj. Pripensinda afero!

Dimanĉon la 14^{an} de septembro

Festo de Amikeco

ĉe Dreiländerecke

Jen poezia invito de Martin Stuppniĝ

Trilandangulo – mia hejmece Arnoldstein

Vidinda ĝi estas la Trilandangulo,
fiere staranta

sub la ĉielo blua.

Tri landoj sin donas tie la manojn
en nia belega landeto Karintio.
Sube, rondume kuŝas vilaĝetoj,
unu pli granda – la alia nur eta,
tien mi iras sopire, ĉiam jam preta;
Trilandangulo vi hejmo mia –
Profunde vi estas en koro mia.

Tie supre en la kvietaj idili
mi povas ĝui



la kvieton kaj trankvil’

povas “eniri” min,

mediti kaj pensadi,

nenio min povas forpuŝadi.

De la arbaro murmuro aŭdeblas:

Kion ĝi volas diri al mi?

Ĉu ion belan – aŭ –

Nur la arboj ion plendas?

Ankaŭ la birdan kantadon aŭdas mi

kun ĝi kortuŝa sonado,

kaj mi ĝin sentas profunde en mi,

ja tiel fariĝas – la vivo – plensenca.

Tie supre sur la hejmmonto de Arnoldstein

vi trovas la internan trankvilecon,

kontenteco aliĝas,

kaj ankaŭ viaj revoj

tie supre hejmiĝas.

Hildegard Köfer, septembro 2007

Esperantigis Martin Stuppniĝ



Internacia RespondKupono

101-jariĝa festo la 1^{an} de oktobro 2008!

IKR-Internacia RespondKupono, pli bone konata per la franclingva nomo, *Coupon-Rèponse Internationale*, estas tiu etdimensia bileto, egalformata en ĉiuj landoj, havanta valoron de poŝtmarko, sufiĉa por afranki leteron, kun maksimuma pezo de 20 g, sendandan al UPU-lando: ĝia nuntempa kosto estas de 1,29 €.

Ekde starigo, en 1874, de UPU-Universala Poŝta Unuiĝo - internacia organizo, kun sidejo en Berno, Svisio, kunordiganta la poŝtajn politikojn de la Ŝtatoj-membroj kaj sekve la tutmondan poŝtan sistemon - ekzistis problemo pri antaŭpago de afranko fare de sendanto al ricevonto.

La ideo pri ĝi ekestis dum la Kongreso de UPU okazinta en Romo, 1906. La unua IRK estis vendita la 1^{an} de oktobro 1907 ĉe poŝtaj giĉetoj de kvardek landoj. Ne ĉiam kaj ĉie deviga estis ties vendado, sed ankoraŭ hodiaŭ ĝi aĉeteblas en la plejparto de la Ŝtato-membroj de UPU, kies aktuala nombro egalas al 116.

Dum la unua jaro de IRK-ekzisto, oni vendis 6.557.200 ekzemplerojn. Ekde ties enkonduko, ĝi estis modifita en siaj aspekto kaj valoro, kaj tiuj ŝanĝoj kutime estis deciditaj dum la UPU-Kongresoj, ordinaraj okazantaj ĉiun kvinan jaron.

La unua aperinta IRK ricevis la nomon "Romo" kaj temis pri aŭtentika artaĵo: florstile kreita de la svisa artisto *E. S. Grasset*, sur ĝi videblas ina figuro, kiu unuigas la du terajn hemisferojn, tenante en mano leteron. Ĝi ĉirkuilis ĝis la jaro 1930, post kiam IRK ŝanĝis sian veston. Tiu nova aspekto ricevis la nomon "Londono": pli modesta, kompare kun la unua, sed same bone zorgita. Sekvis la modelo "Vieno" (1966), en kiu la spacoj por la poŝtaj stampoj estis metitaj ne ĉeflankaj kiel antaŭe, sed unu super la alia, kaj poste tiu "Laŭzano", la unua en kiu ne estis indikita la nomo de la emisianta lando, deviga ĝis tiu jaro 1975.

La plej signifa ŝanĝo en ĝiaj aspekto kaj konsisto estis farita ekde la 1^a de januaro 2002, sekve de la decidoj alprenitaj dum la Kongreso en Pekino (1999). La IRK pligrandiĝis dimensie kaj la papero, sur kiu ĝi estas presita, iĝis pli dika, iom simila al tiu ĉeka, kaj, samkiel la ĉekoj, sur la dorsa parto ĝi havas sian identigan liternumeran kodon, dank' al kiu eblas ekscii pri emisianta lando, presdato, limdato, sinsekva numero de ĉiu kupono, ktp.

Okaze de la 100-jariĝo (2007) estis emisiita celebra kupono, ricevinta la nomon "Pekino 2", verko de la



ukraina artisto *V. Taran*. Sur ĝi aperas du manoj, kies montraj fingroj estas kvazaŭ intertuŝigantaj: ĉu inspirfonto estis la fama bildo en la "Universala juĝo" de Mikelanĝelo, en la Vatikana *Cappella Sistina*? Fone, videblas poŝtmarko memoriganta la eventon: "100 jaroj 1907-2007". Ĝin ricevis nur tiuj poŝtaj administraj, ĝin mendintaj: fakte ne ĉiuj UPU-Landoj vendas IRK-ojn, sed ĉiuj estas devigitaj ilin akcepti.

Tre koncize iom da historio pri la Internaciaj RespondKuponoj, kiuj - krom esti objekto de kolektemo por filatelistoj - ludis grandan kaj gravan rolon ankaŭ en nia Esperantujo. Ĝi efektive egalas al mono: dank' al ĝi, oni povis aĉeti librojn, aboni gazetojn, revuojn, pagi kotizojn por partopreni aranĝojn ktp. Inter Esperantistoj-filatelistoj, ĝi estis uzata kiel valor-mezurilo en la interŝanĝado de esperantaĵoj.

Sed nuntempe kiom da personoj uzas IRK-n? Laŭ statistikoj, ĉiujare estas disvendataj ĉirkaŭ 2 milionoj da ekzempleroj. Kaj la plej oftaj uzantoj estas studentoj kaj radioamatoroj: iam ankaŭ esperantistoj, ĉefe en siaj rilatoj kun UEA, sed...

finiĝis la erao de RespondKuponoj!

Dum multaj jardekoj UEA akceptis pagojn per internaciaj respondkuponoj. Ili estis simpla pagmaniero, kiam internaciaj monĝiroj per banko aŭ poŝt-mandato estis malfacile fareblaj kaj subigitaj al diversaj limigoj aŭ eĉ ne permesitaj al privatuloj.

Lastatempe ilia uzado maloftiĝis, ĉar internaciaj pagoj fariĝis pli facilaj dank' al la forigo aŭ mildigo de limigoj kaj pro disvastiĝo de kreditkartoj kaj de retaj pagmanieroj kiel ekz. PayPal. En 1997 UEA ankoraŭ ricevis 1652 respondkuponojn sed en 2007 nur 43, tio estas 2,6% de la nombro dek jarojn pli frue.

Iĝis komplika ankaŭ la ŝanĝado de la kuponoj en poŝtmarkojn, ĉar nuntempe la poŝtejo, vidalvida al CO, ne plu akceptas ilin, kaj ĉi-jare nur per escepta aranĝo la poŝta entrepreno TNT konsentis akcepti de UEA, por la lasta fojo, kvanton da kuponoj. Plie, antaŭe, ili ankaŭ havis senliman validecon, sed jam de kelkaj jaroj ili validas nur ĝis la dato presita sur ili. Parto de la kuponoj, kiujn UEA lastatempe ricevis de siaj membroj kaj klientoj, estis jam senvaloraj. Evidente ili ĉirkuilis inter pluraj homoj, kaj neniu rimarkis, ke ilia valideco estis tempe limigita. Pro la priskribita evoluo, UEA ne plu akceptas IRK-ojn kiel pagilojn por kotizoj aŭ servoj nek por aldoni bonharon al UEA-kontoj.

Malleviĝas la kurteno sur scenejo kie grave aktoritis IKR, eta folieto havanta valoron, ne nur nominalan. Ĝi estis ankaŭ ilo por faciligi la daŭron, en la tempo, de kontaktoj kaj rilatoj inter homoj, kiuj danke al korespondado trovis aliron al alilandaj kulturoj, al malsamaj medioj, preskaŭ en la tuta mondo: sufiĉis enmeti en koverton la mirindan IKR-n por ke la adresito havu materialan helpon por liveri respondon.

Forpasas la tempo, ŝanĝiĝas kutimoj, iloj renoviĝas, ĉio moderniĝas. Tiel plurais la vivo (ankaŭ en Esperantujo).

Triesto kaŝita

La ŝtonpunta rozo de la triesta Katedralo dediĉita al Sankta Justo (*San Giusto*) kaŝas tre kuriozan historion. Kiam en Triesto estis episkopo *Rodolfo Predazzani*, ĉirkaŭ en la jaro 1300 (bedaŭrinde ne ekzistas dokumentoj pruvantaj la ĝustan daton), oni estis laborantaj por la unu-igo de du preĝejoj tiam situantaj sur la monteto Sankta Justo. La ĉefan fasadon de tiu nova preĝejo oni intencis plibeligi per granda rozo el blanka karsta ŝtono. Episkopo *Predazzani*, el *Cremona* (urbo de Lombardujo, nord-italia regiono), decidis tajligi rozon egalan al tiu de la Katedralo en lia devenurbo. Tial li venigis al Triesto el *Soncino*, vilaĝo apud *Cremona*, lertajn faklaboristojn kiuj kun siaj familianoj enloĝiĝis en dometoj, lokigitaj en la kvartalo *Servola*, posedaĵoj de la episkopa administrejo.

Ankoraŭ hodiaŭ, post tiom da jarcentoj, spurojn pri tiu amasa enmigro oni retrovas kaj en la nomo de la strato “*Via dei Soncini*”, kiu indikas ĝuste la rezid-zonon de tiuj historiaj ŝtontajlistoj, kaj en la nomoj de diversaj familioj tie loĝantaj, kiaj *Sanzin*, *Soncin*, *Soncino*.

Dekoligita Sankta Justo

Ĉe la enirejo de la sonorilturo, apudstaranta la Katedralon, estas lokita en gotika niĉo statuo de Sankta Justo. Protektanto de la urbo, tiu havas en la maldekstra mano la simbolojn de Triesto kaj la palmon de martiriĝo en la dekstra. Temas pri verko malfacile datebla: oni supozas farita en la 10^a-11^a jc. Tre interesa estas la Sanktula kapo, kiu tute ne kongruas kun la restanta statuo: eĉ ĝi datas pli frue ol la statuo mem, eble el romia epoko.

Tiu diferenco pri datado inter la du “pecoj” ja rimarkeblas eĉ post supraĵa ekzameno: tre nesimetria estas la alligiĝo de la kolo, observeblas malproportio inter kapo kaj brusto kaj, ĉefe, la skulptaĵa stilo tute malsimilas.

El tio evidentiĝas la emo de triestanoj, heredita de praavoj, ŝpari, ŝparegi! Fakte bone konatas ilia devizo: neniam oni devas ion forĵeti... (*no se buta mai via niente*).



Invitmesaĝo de ITALA ESPERANTISTA JUNULARO

De la 18^a, jaŭdo, ĝis la 24^a, merkredo, de septembro okazos en Italujo nova junulara aranĝo, iom **malsimila** de la ĝisnunaj. Ĝia nomo estas Semajno de Kulturo Internacia (SKI), sed ĝi ne okazos sur **neĝo**... Sintezite, urbestroj de 6 urbetoj en la ĉirkaŭaĵoj de *Pisa* invitas **25** junajn esperantistojn ne-italajn kaj **10** italajn dum unu semajno en siaj urboj por prezenti proprajn kulturojn kaj Esperanton al la lokaj mezgradaj studentoj kaj junularo ĝenerale. **Ili pagos ĉion surloke** (de alveno ĝis foriro: manĝoj, dormoj, moviĝoj), interŝanĝe de tiu **“kultura laboro”**.

Sekve, oni ne petas aliĝojn (nenio estas pagenda, nur oni zorgu alveni ĝustatempe...), sed **kandidatiĝojn**, ĉar respondecado de Itala Esperantista Junularo estas provizi kiel eble plej **“varian”** kaj **“kvalitan”** partoprenantaron, ankaŭ ĉar aliaj urbestroj italaj jam enviciĝis por ripeti la eksperimenton estonte.

Inter la kandidatoj oni rapide elektos la partoprenantojn.

Jen la kandidatiĝa demando:

- | | |
|-------------------|-------------------|
| (1) Nomo | (2) Familia Nomo: |
| (3) Sekso: | (4) Naskiĝdato: |
| (5) Retadreso(j): | (6) Loĝurbo: |
| (7) Adreso: | (8) Nacieco(j): |
- (a) Kiam kaj kiel vi esperantiĝis?
(b) En kiuj esperanto-renkontiĝoj vi jam partoprenis?
(c) Kiel vi prezentus vian landon al mezlernejaj knaboj?
(ĉ) Ĉu vi konas popolajn dancojn el via lando? Kiujn? Ĉu vi pretas ilin montri?
(d) Ĉu vi kapablas ludi muzikon aŭ kanti popolajn kantojn de via lando?
(e) Ĉu vi kapablas kuiri tipajn manĝaĵojn el via lando? Kiujn?

Ĝin sendu, plenigitan per koncernaj informoj al
kandidatigxoj.ski@gmail.com

Internacia Fotokonkurso

Post dek sukcesaj konkursoj (1998–2007), la redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al partopreno en la 11^a Internacia Fotokonkurso. En ĝi rajtas partopreni ĉiu fotemulo, amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj, kies minimuma formato estu 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Oni NE akceptas fotojn senditajn elektronike.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina GORECKA (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando; rete: sezonoj@kanet.ru) kaj ŝin atingi antaŭ la 1^a de decembro 2008.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto estu kunsendata slipo kun pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso NE rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos jenajn premiojn:

- 1) 50 € kaj abono de “La Ondo de Esperanto” en 2009.
- 1) 25 € kaj abono de “La Ondo de Esperanto” en 2009.
- 2) Abono de “La Ondo de Esperanto” en 2009.

Speciala premio (50 € kaj abono de “La Ondo de Esperanto”) por la plej bona foto pri la temo “Vizaĝoj”. Ĉiu premioto ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en “La Ondo de Esperanto”. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31^a de decembro 2010 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn. Poste, la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj aŭtoroj.

Legu pri la antaŭaj fotokonkursoj kaj vidu plurajn premiitajn fotojn en la retejo de “La Ondo” <http://www.esperanto.org/Ondo/>, rubriko “Internacia Fotokonkurso”.

Malfermitaj pordoj - Lingvoj sen baroj

Mardon la 7^{an} de oktobro 2008 - 16h00

Aŭlo de Supera Lernejo pri Modernaj Lingvoj
por Interpretistoj kaj Tradukistoj
Via Filzi 14 – Trieste

Con il patrocinio:



Provincia di Trieste



Università degli
Studi di Trieste

16.00

Pier Luigi SABATTI, debatestro

Giovanni GREGORI

Alt-Adriatikaj gentoj survoje al Eŭropo

Lorenza REGA

Edukado kaj libera cirkulado de lingvoj

Bojan BREZIGAR

La problemaro de minoritataj lingvoj

Debato pri la traktitaj temoj

Paolo ALESSI

UNESKO kaj lingvaj rajtoj

Zlatko TIŠLJAR

Interkultura identeco en Eŭropo

Ranieri CLERICI

Malfermitaj pordoj, tiel malofte trapasataj: kial?

Debato pri la traktitaj temoj kaj konkludo

In collaborazione con:



Centro Unesco Trieste



A.L.U.T.

17.30

Konu vin mem!

(Dua parto)

Ĉu pretaj por la dua parto de la testo? Sur folio skribu la respondojn kaj, fine, kontrolu la rezultojn en la sekva paĝo.

Ĉe la malklara akvoĉflako, staras alia kun klara akvo kaj en ĝi videblas mono.

9) Ĉu vi prenas la monon?

- jes
- ne

Vi esploras la kastelon kaj, trovinte la elirejon, ĝin trapasas: ekstere, granda ĝardeno, kie, tere, kuŝas skatolo.

10) Kia estas la skatolo?

- malgranda
- mezgranda
- granda

11) El kiu materialo estas la skatolo?

- kartono
- papero
- ligno
- metalo

En la ĝardeno proksime de la skatolo staras ponto.

12) El kio estas farita la ponto?

- metalo
- ligno
- rotango

Aliflanke de la ponto staras ĉevalo.

13) Kia estas la koloro de la ĉevalo?

- blanka
- griza
- bruna
- nigra

14) Kion estas faranta la ĉevalo?

- ĝi staras senmova kaj trankvila
- ĝi estas manĝanta herbon
- ĝi kuras tien kaj ĉi-tien

HO VE!!! Aertrombo superŝvebas! Vi estas proksime de la ĉevalo: tri estas la ebloj.

- vi kuras por vin ŝirmi en la skatolo
- vi kuras por vin ŝirmi sub la ponto
- vi kuras al la ĉevalo, saltas sur ĝin kaj forgalopas

sekvapaĝe →

La pomo

Unu tagon la rabeno sentis subite neregeblan deziron manĝi porkaĵon, unuafoje dum sia vivo. Li timete eniris nejudan restoracion kaj mendis rostitan porkaĵon. Ĝuste kiam la kelnero estis alvenonta kun la preta plado, la rabeno atentis kun embaraso, ke du viroj el sia komunumo estis enirantaj la restoracion.

Alvenis tiam la kelnero kun la plado: Granda porkaĵo ornamita per ruĝa pometo.

Diris tiam la rabeno, tre laŭte: "Kia stranga restoracio! Oni mendas kuiritan pomon kaj vidu, kion oni ricevas!"

(Fonto: la retlisto de amantoj de judaj humoraĵoj)

Septembra Programo	
02 - mardo	12h50 - Radio TSA (slovenlingve) - Esperanto-eventoj en Triesto
05 - vendredo	20h00 - Reaktiviĝo: ni tostu je sukcesa estonteco de TEA kaj planu la laborojn por la venontjara IFEF-Kongreso en TS!
09 - mardo	20h00 - Preparoj por Kristnaska ekspozicio
12 - vendredo	20h00 - Legado de artikolo de Josef Ŝemer pri la Israela Ŝtato
14 - dimanĉo	Festo de Amikeco sur Monto Forno
15 - lundo	14h50 - Radio UNO - Intervjuo kun...
16 - mardo	20h00 - Projekto "Malfermitaj Pordoj"
19 - vendredo	20h00 - Gramatika Vesperto
23 - mardo	20h00 - Preparoj por Kristnaska ekspozicio
25 - ĵaŭdo	18h30 - Salono Beethoven - Liederabend
26 - vendredo	20h00 - Ni parolu pri venontaj kursoj de Esperanto: informado kaj instruado
30 - mardo	20h00 - Preparoj por Kristnaska ekspozicio

Komence de oktobro startos unua- kaj dua-gradaj kursoj (informoj ĉe Elda), dum la Koruso VERDAJ ANĜELOJ ekos sian ekzercadon post interkonsento kun ties direktorino Devana. Sed, plej grave, jam ekde TUJ, ni komencos serioze prepariĝi por la evento de la jaro 2009^a, nome la Jubilea Kongreso de IFEF-Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazonta en la lasta semajno de majo! Do, ni atendas vin ĉiujn, ekde la 5^a de septembro, en "via" TEA-sidejo je la 19^a horo.

Jen la klarigoj pri la testo: **Konu vin mem! - dua parto**

10) Grando de la skatolo:

Malgranda – malforta egoo

Mezgranda – mezforta egoo

Granda – fortega egoo

11) La materialo de la skatolo

Karton/papero/ligno (ne brila): modesta personeco.

Metal: personeco orgojla kaj tro memfida.

12) La materialo de la ponto:

Metal: vi havas tre fortan ligon kun viaj amikoj.

Ligno: mezfortan ligon kun viaj amikoj.

Rotango: vi ne estas en bonaj rilatoj kun viaj amikoj.

13) La koloro de la ĉevalo:

Blanka: via kunulo nestas feliĉe en via koro.

Griza/bruna: via kunulo tute ordinaran lokon havas en via koro.

Nigra: via kunulo ŝajne ne estas feliĉa en via koro: ĉu forironta?

14) La ago de la ĉevalo:

Ĝi staras senmova kaj trankvila/ĝi estas manĝanta her-

TEJO serĉas volontulon! Kandidatiĝu por la posteno de plentempa volontulo en Roterdama CO! Temas pri laborperiodo daŭranta 12-18 monatojn, ekde la 1^a de novembro 2008. Limdato por kandidatiĝi estas la 15^a de septembro. Informoj ĉe <http://www.tejo.org/node/49>

Oktobra Programo	
03 - vendredo	20h00 - Kion ni scias pri "Monfalsado"?
07- mardo	16h00 - Salono de la Supera Lernejo pri modernaj lingvoj por tradukistoj kaj interpretistoj Projekto "Malfermitaj Pordoj"
10 - vendredo	20h00 - JAPANA VESPERO - filmo
14- mardo	20h00 - Preparoj por Kristnaska ekspozicio
17 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> esperante, itale, triestradialekte
21 - mardo	20h00 - Preparoj por Kristnaska ekspozicio
24 - vendredo	20h00 - Gramatika vespero
28 - mardo	20h00 - Preparoj por Kristnaska ekspozicio
31 - vendredo	20h00 - Ni iom parolu pri la... diablo!

Librosubvencioj por Esperanto-bibliotekoj

Denove ŝanco pligrandigi siajn kolektojn senpage, ĉar ankaŭ ĉi-jare UEA disdonos subvenciojn de la *Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen*. Rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, sen subteno de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Oni sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. Subvencio oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. La petoj atingu la UEA-CO ĝis la 15^a de oktobro. Krom papere (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin rete al direktoro@co.uea.org. Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la komencan bonharon de la Biblioteka Apogo, eblas konatiĝi reteje: www.poulthorsen.dk.

bon: via koramiko estas tre simpla kaj humila persono.

Ĝi estas ĉirkaŭkuranta: via koramiko estas ofendiĝema persono.

Kaj jen la lasta testo-parto, la plej grava: la konkludo dependas de vi, nome kiel, laŭ vi, finiĝos ĉi historio... *Alproksimiĝas aertrombo...* Kion vi elektis?

Jen la signifo de la diversaj objektoj:

Aertrombo: problemoj en via vivo

Skatolo: vi mem

Ponto: viaj amikoj

Ĉevalo: via kunulo

Do, se vi elektis la *skatolon*, la problemojn vi surprenas, kiam ajn ili prezentiĝas.

Se vi elektis la *ponton*, vi vin turnas al viaj amikoj, kiam ajn problemojn vi devas alfronti.

Laste, se vi elektis la *ĉevalon*, vi serĉas vian partneron ĉiuforte kiam li/ŝi aŭ vi mem renkontas problemon.

Espero estas, ke tiu ĉi testo kontribuos al atingo de plena klareco pri via naturo: se jes, ankaŭ viaj rilatoj kun partnero kaj geamikoj povos esti pli kristalpuraj kaj sinceraj.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coronio 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; noredv@tele2.it
Grupa ttt-ejo: it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtekkonto N° 10834349